

La Progreso

REDACTIE-
COMITE

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

PROBLEMOJ SOLVENDAJ

III

La esperantistoj ĉiam deklaris, ke ilia lingvo ne estas matematiko, sed ke ĝi permesas la plej subtilajn nuancojn de la penso, kaj ke la gramatika sistemo prezentas multe pli vastan kaj liberan eblon por krei novajn vortojn kaj ideojn. Se ni deziras konstantigi tiun laŭdindan principon, ni ne absolute fiksu ĉiun regulon tia, ke ĝi jam ne permesos iom devian formon. Nia gramatiko ne estu kvazaŭ fera kaĝo, tra kies kradoj ni eĉ ne povas movi la bekon.

Fiere ni certigas, ke Esperanto estas uzebla en literaturo, sed, se ni rezigne obeus la malpermesemajn aŭtoritatemulojn, niaj aŭtoroj kaj tradukantoj sin sentus devigitaj apliki nur tiujn formojn, kiuj trovas plaĉon ĉe la nomitaj sinjoroj. Ili jam ne kuraĝus uzi la aŭtoran liberecon en esprimado, sed devus sklave sekvi la „ĉiampravajn“ kritikemulojn.

La veraj problemoj, la demandoj nepre postulantaj solvon, ne estas tiom multaj. Ni menciis jam la vorteton „po“. Ni aldonu nur: la dubon inter adjektivo kaj adverbo, la direktoindikan akuzativon en ekz. „pluen, alten“, la influon de la logika subjekto sur la refleksivo, la uzon de l' artikolo antaŭ kelkaj propraj nomoj. Ĝenerale oni opinias, ke almenaŭ tiuj problemoj postulas, se ne devigan solvon, tamen ian reguligon.

Nenies persona solvo povas esti deviga por aliaj; ankaŭ ne, se tiaj solvoj estas prezentitaj en la plej legaspekta gramatika verko. Solvi ilin, aŭ almenaŭ aŭtoritate konsili pri ili rajtas nur la Lingva Komitato. La Lingva Komitato! Ĉu ekzistas ankoraŭ la Lingva Komitato? Ni eksciis, ke ĝia prezidanto tuj post la milito klopodis religi la kontakton kun ĝiaj disaj membroj. Ni konfesas, ke lia tasko ne estas facila, ĉar ne sufiĉas nur religi la kontakton; necesas ankaŭ kribri la membrojn. Por la Lingva Komitato ni bezonas ne honoravidajn membrojn, sed kompetentajn kaj... aktivajn. Ni tamen esperu, ke post ne tro longe la L.K. sin remontrus al ni plene viva kaj vigla kaj avidega pro... laboro.

Jam prezentiĝas al ĝi urĝa tasko: ĝi kontribuu al solvo de la premanta embaraso ĉi supre menciita. Ni scias, ke la regularo de la L.K. ne

permesas dekreti al ni la vojon. Ni scias ankaŭ, laŭsperte, ke la L.K. ne misuzis sian aŭtoritaton por trudi al ni nedeziratajn leĝojn. Ĉiam ĝi agis sin- kaj . . . ningarde, eble iom tro. Kaj ĝuste pro tio ni konfide proponas al la restarigota L.K., ke ĝi okupu sin serioze pri kelkaj plej urgaj problemoj. La esperantistaro, ne nur la apogon bezonantaj ordinaruloj, sed ankaŭ la nun morde kritikataj aŭtoroj kaj tradukantoj, estos al ĝi tre dankaj.

Tiu ĉi artikolo rezultas ne nur el funda ripenso pri la traktita problemoj, sed precipe el korespondado kun diversaj intelektuloj en nia movado, prave nekontentaj pri la oftaj „interherezigoj“ de aŭtoroj. Unu el niaj korespondantoj, d-ro Pawlik, skribas: „La aŭtoritatuloj kritikis reciproke iliajn verkojn aŭ opiniojn“ kaj demandas: „Ĉu tio povas kuraĝigi la komencantojn? Eble tio estas unu infer la kaŭzoj, pro kiuj multaj homoj eklernas Esperanton kaj poste forfalas el la movado.“

„La aŭtoritatuloj interkonsilu kaj interkonsentu pri dubaj demandoj en L.K. aŭ père de L.K., kaj poste eldonu „rekomendojn“. Ne gravas, ĉu la rekomendoj estos la plej bonaj aŭ plej-logikaj; sed gravas, ke nia movado montriĝu unueca en la tuta mondo, por ke la malfavoruloj de Esperanto ne povu mokridi.“

Precipe tiujn ĉi lastajn esprimojn ni plenkonsente subtenas!

PROSPECTUS EXAMENS 1948

Op aanvraag verkrijgbaar bij de adm., Roelantstr. 4, Amsterdam-W.

NEOLOGISMOJ

lu leganto petis al ni klarigojn pri aro da neologismoj. Ni donas ilin ĉi sube:

alidado: topografia instrumento por alinigi; ĝi konsistas el du fenditaj lamejoj, paralele elstarigeblaj

alkado: hispana oficisto kun komunumestra kaj juĝista aŭtoritatoj

Alzaco: franca departemento (Elzas)

Areopago: plej alta juĝejo en antikva Grekio (Athene)

arkada: laŭ arkadoj, trankvile vivanta paŝtista popolo en antikva Grekio; ankaŭ figure uzata en poezio

arkado: arkajo sur kolonoj

Barbado: (Barbados), insulo en Antiloj

cenotafo: luksa tombomonumento por ne trovita mortinto

centigrada: aparato dividita en cent gradoj

cikado: insekto el familio, al kiu apartenas i.a. ankaŭ nia cerkopo (schuim-beestje)

dromajo: aŭstralia struto (emeu)

esplanado: larĝa promenvojo

galnago: stiltbirdo el la familio skolopecidoj (watersnip)

hektografo: aparato por kopii skribitan tekston

inkunablo: libro presita inter 1423a kaj 1556a

kaligrafo: skribartisto (schoonschrijver)

kamajo: reliefo polurita, diverskolora gemo (kameo)

karbonado: ripa viando, origine: superkarbo rostita viando

lumbago: reŭmatisma doloro en la lumbo (spit)

maharaĝo: hinda princo (maharadja)

markgrafo: origine grafo reganta super limteritorio (markgraaf)

mirmekofago: sendenta mambesto en Sud-Ameriko (Myrmecophaga)

Olimpiado: 1e, olimpiaj ludoj; 2e, 4-jara periodo inter la olimpiaj ludoj; post 776a a. Kr. oni kalkulis laŭ olimpiadoj

papajo: (Carica Papaya), planto en Javo, kun manĝeblaj radikoj

olografa: tute, propramane, elskribita

Plejado: (Pleyaden), konstelacio (sterrenbeeld)

rulado: muzika vibrado (triller)

saksifrago: planto el la familio saksifragacoj (steenbreek)

sagro: afrika ĉevaleto

smalao: araba tendo

stado: certatempa stato (stadium)

stereotipado: presado helpe de formoj, faritaj el fluida metalo, verŝita en matrico

ultra: pseŭdosufikso, signifanta: ekstrema, troigita, aliaflanka

vertago: mallongpieda hunda raso (taks)

POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men, voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Betrekkelijke voornaamwoorden.

In het Nederlands komen zinnen voor, waarin men over eenzelfde persoon of zaak meerdere dingen mededeelt, bijv.: *De man, die daar gaat, is mijn vriend.* Deze zin bestaat uit: een hoofdzin: *de man is mijn vriend*; en een bijzin: *die daar gaat*.

Het boek, dat ik gisteren las, is mooi. Hoofdzin: *het boek is mooi*; bijzin: *dat ik gisteren las*.

De woordjes „die” en „dat” in de bijzinnen zijn betrekkelijke voornaamwoorden. Ze zijn voornaamwoorden, omdat ze voor een naamwoord in de plaats komen te staan, en betrekkelijk, omdat ze betrekking hebben op reeds genoemde zelfstandige naamwoorden, n.l. „man” en „boek”. Nog vele andere woorden komen voor als betrekkelijk voorn. woord, bijv.: „wat, hetwelk, wie, welk, hetgeen, wier, wiens” e.a.

Deze woorden hebben dus betrekking op een reeds genoemde zaak, het antecedent genaamd, zij wijzen daarop terug.

Een betrekkelijk voorn. woord doet tevens dienst als voegwoord, omdat het een hoofdzin met een bijzin verbindt. Het is dan onderschikkend, omdat het de éne zin (bijzin) aan de andere (hoofdzin) ondergeschikt maakt; wat na dit onderschikkend voegwoord staat is een aanvulling van de hoofdzin.

In Esperanto komen als betrekkelijk voorn. woord (*rilataj pronomoj*) voor: „kiu, kio, kia en kies”, bijv.:

La viro, kiu iras tie, estas mia amiko. *Ne ĉio, kio brilas, estas oro.* *Tia kostumo, kia via, estas malnoviĝinta.* *La knabo, kies hundo mortis, ploris.*

Als het antecedent in het meervoud staat, krijgt ook het betrekkelijk voorn. woord een *j* achter zich, bijv.: *la infanoj, kiuj ludas tie, estas kontentaj.* Men zegt dan, dat het betrekkelijk voorn. woord zich regelt in getal naar het antecedent.

Het betrekkelijk voorn. woord in de 4e naamval.

Niet altijd staat het betr. voorn. woord in dezelfde naamval als het antecedent, want er is sprake van een hoofdzin en een bijzin, dus twee zinnen, die apart ontleed worden. Bijv.: *La viro, kiun vi vidis, estas malsana.* *Tio, kion vi diris, estas vera.* *Kun tia viro, kian vi prezentis al mi, mi ne iros.* *Tiaj tabeloj, kiajn vi rakontis al mi, estas belaj.*

Een zin als: *Degene, die ijverig studeert, zal slagen*, wordt niet altijd vertaald als volgt: *Tiu, kiu fervore studas, sukcesos.* Ook wel: *Kiu fervore studas, sukcesos.* In de laatste zin is het antecedent weggelaten en het betrekkelijk voorn. woord doet ook als zodanig dienst. Dit mag slechts, als het antecedent, dat voorn. woord is, in dezelfde naamval staat als het betrekkelijk voorn. woord, bijv.: *Kiu batas edzinojn, vundas sin mem.* Maar: *Tiu, kiun vi renkontas, estas kapabla esperantisto.* *Tion, kio estas malbona, vi ne faru.*

Ter vertaling? Opgave 4.

De leerling las het boek, dat ik hem gaf, aandachtig. Het huis, waar de man inging, is oud en vervallen. Wie het laatst lacht, lacht het best. Wat hij deed, was niet juist. Met zo'n pen, als u mij gaf, kan ik niet schrijven. Iemand, die hulp nodig heeft, moet men niet voorbijgaan. De leerlingen, wier taken de onderwijzer controleerde, zijn zeer ijverig. Zo'n vreemd boek, als dit, heb ik nog nooit gelezen. Alles, wat u hier ziet, heb ik met hard werken verkregen.

Vertaling van opgave 2.

La ĉielo estas sennuba¹⁾; la suno brilas hele²⁾. La infanoj ŝajnis³⁾ tre feliĉaj. Li ŝajnas bona knabo. Ni ĉiuj deziras fariĝi kapablaj⁴⁾ esperantistoj⁵⁾. Kio fariĝos via filo⁶⁾? Kia⁷⁾ estas lia⁸⁾ konduto? La papero flaviĝis⁹⁾ pro¹⁰⁾ la suno. Li aspektis malbona¹¹⁾ la lastajn tagojn. Tio¹²⁾, kion li diris, montriĝis¹³⁾ ne vera. Ni restas fidelaj¹⁴⁾ al¹⁵⁾ nia idealo. Knabo, restu staranta¹⁶⁾! Infanoj, estu ĉiam kontentaj. Li estas konata kiel bona esperantisto¹⁷⁾.

1) Minder juist is: *sennebulaj; nebulo* = nevel. 2) Ook: *brilegas, brilas forte*. 3) Overbodig is: *estis* na *ŝajnas*; dit noemt men een pleonasme. 4) Ook: *sper-taj*, d.i. ervaren. 5) Niet: met een N; „kapablaj esperantistoj” is het naamwoordelijk deel van het gezegde *fariĝi kapablaj esperantistoj*; dit staat altijd in de eerste naamval. Zie: La Pr. No. 2, Het Gezegde. 6) Minder juist is: *Kian metion elektos via filo?* Het is niet zeker of er sprake is van een ambacht. 7) Niet: *kiel*; het antwoord kan immers zijn: *bona of malbona*; men vraagt hier naar een eigenschap. 8) Niet: *sia*; dit bezittelijk voornaamwoord wijst een onderwerp in de derde persoon als de bezitter van iets aan, bijv.: *li batis sian hundon*, het kan dus nooit in een onderwerp voorkomen. 9) Ook: *fariĝis flava*. 10) Niet: *per*; d.i. door middel van, waarbij men dan nog denkt aan iets of iemand, dat of die de handeling verricht. Dit laatste

LA ESPERANTA KRESTOMATIO

El kelkaj kritikoj ni lernis, ke oni ne tute komprenas la ŝanĝojn, kiujn oni faris en la tekstoj, uzitaj por la kompilo de la Esperanta Krestomatio. La kompilintoj supozis, ke iliaj averto kaj klarigoj en la antaŭparolo sufiĉos, sed evidente ili estis iom tro optimismaj.

Kompreneble eblas malsamopinie pri la diversaj ŝanĝoj, ĉar verŝajne ne ĉiu ŝanĝo trovos la aprobon de ĉiu. Kaj atente al la ĝenerala stato eĉ dubindas, ĉu eĉ unu ŝanĝo estas farebla, al kiu neniu skrupulas. Kaj fine eĉ plej bona volo kaj plej granda zorgemo ne evitigos kelkajn kritikindaĵojn; ĝis nun ankoraŭ nenio estis perfekta kaj certe la kompilintoj ne havis esperon pri la akiro de tiu epiteto por sia laboro.

Do ne povas temi pri la absolutaj ĝusteco kaj taŭgeco de ĉiu unuopa ŝanĝo; temas pri la demando, ĉu entute iu ajn ŝanĝo de teksto estas pravigebla.

Ni senrezerve konsentus la nedezirindecon de ŝanĝoj, se ekzistus la intenco prezenti fidelan bildon de iu ajn teksto, aŭ se temus pri verketo por supera kurso. Tial mi ne povas aprezi la fakton, ke oni korektis (?) la malnovan testamenton, tradukitan de Zamenhof, ĉar tiu teksto nun ne estas fidinda por studi la zamenhofan lingvouzon.

Tamen, tio ne concernas E.K. Ĝia celo estis doni konvenan tekston al komentantoj, al tiuj, kiuj studas por la elementa diplomo. La verketo estas destinita por tiuj, kiuj havas nur *supraĵan kaj malvastan scion* pri Esperanto, do por personoj, kies distingopovo estas ankoraŭ tre malforta, se ĝi almenaŭ ne tute mankas!

El la praktiko ni lernis, ke la diversaj formoj, nun konsiderataj eraraj aŭ arĥaikaj, efikas ĝene en la kursoj por la elementa diplomo. Ne jam venkinte la diversajn malfacilaĵojn de la komenca instruo, la kursgvidanto estas pli malpli

devigita suriri la terenon de lingva evoluo kaj praktiki konsiderojn kaj demandojn, por kiuj la lernanto ankoraŭ ne estas matura.

Sur bazo de tiuj spertoj ni decidis forigi tiujn malfacilaĵojn, kies konservo en la tekstoj havus nenian valoron por tiu ĉi instruo, kaj envere efikus nur bremse. Ni povus esti evitintaj la dilemon, se ni estus verkintaj tute novajn tekstojn, pri kiuj ni mem posedus la traduk- aŭ aŭtorrajton, sed ĉu tio estus tiom trafa?

Ni prave fieras pri jam konsiderinda literaturo, en kiu troviĝas veraj perloj kun modela stilo kaj bonega enhavo.

Ĉu ne estus alloge jam senbrue kutimigi la lernanton al tiu modela stilo kaj per la bona ekzemplo puŝi lin en la ĝusta direkto?

La valoro de iu teksto de Zamenhof, Lanti, Privat k.t.p. ja ne perdiĝas per iu akcesora modifo!

Ĉu la formo „iu vidvino havis du filinojn” signifas *esencan* ŝanĝon de la originala teksto: „unu vidvino havis du filinojn”?

Iu kritikinto diris ankaŭ, ke la aldono de la Jesua Parolado sur la Monto „donas al la verketo *religian karakteron*, kiu ne bonvenigas ĝin en ĉiuj medioj”. Ni deziras ĉi tie konigi ion el la kuirejo de nia Esperanta Krestomatio: La konkernata teksto estas proponita de la subskribinto, *nekrucebla liberpensulo!* Evidente ekzistas diversaj opinioj pri dogmemo kaj liberpensado. Ni nun atendas senpacience, ke iu nomas E.K. islama, pro la konata rakonto „Naskiĝo de la tabako!”

Mi esperas, ke mi per tiu ĉi iom vasta komento elmondigis la miskomprenon, kaj ke oni ne vidos plu en la kompilintoj aron da konspiriloj kontraŭ la netuŝebleco de nia Fundamento, kaj intrigantojn kontraŭ la verkoj de niaj plej eminentaj stilistoj.

W. F. Kruit.

geldt ook voor „de”; dit gebruikt men dan na een lijdend deelwoord, bijv.: *La papero estas difektita de la knabo.* 11) Ook: *nesana, ne tute sana.* Niet: *malbone; aspekti* is een koppelwerkwoord, *malbona* noemt na dit koppelwerkw. een eigenschap van het onderwerp. 12) Niet: *Kio li diris, montriĝis ne vera.* Zie in deze rubriek: Het betrekkelijk voornaamwoord in de 4e naamval. 13) Ook: *evidentiĝis, pravigis.* 14) Niet: *fidela*; hier heeft men met meervoud te doen. 15) Ook, hoewel minder gebruikelijk: *pri.* 16) Niet: *leviĝu*; hierbij denken wij aan iemand die zit of ligt en er bevolen wordt

op te staan. Ook: *ekstaru*, men veronderstelt dan dat iemand liep. 17) Niet: *bonan esperantiston*; dit kan wel in een zin als: *Mi konas lin kiel (mi konas) bonan esperantiston*; de vertaalde zin luidt: *Li estas konata kiel bona esperantisto (estas konata)*, hier heeft men dus te maken met een onderwerp.

Beoordeling:

J.R. en A. 7, Astor 9, A.A.D. en Z. 9, C. v. B. en M. 7, E.R.M. en S. 9, B. v. M. en R. 6, Romo 7, T.S. en A. 5, Jo 8, S. v. W. en H. 7, H.J. en G. 5, Sj. T. en L. 4, Stelano 7.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 4. Vertaal in Esperanto en leer de woorden die u niet kent.

HET HUIS, WAARIN WIJ WONEN.
(Slot).

Laten wij nu de huiskamer (*loĝoĉambro*, *familia ĉambro*) een bezoek brengen. Evenals in de keuken en in de slaapkamers is de vloer bedekt met zeil (*linoleumo*). In het midden van de kamer ligt op dat zeil het vloerkleed. In het midden van de kamer of voor de vensters staat een rechthoekige tafel, gedekt met een tafelkleed. Voor de vensters hangen gordijnen. Boven de tafel hangt een lamp of een kroon (*lustro*). Enige stoelen en twee fauteuils (*foteloj*) of armstoelen nodigen ons uit om plaats te nemen (*eksidi*, *sidigi*). Een hangklok of een pendule zegt ons hoe laat het is (*informas nin pri la tempo*). Aan (*ĉe*) een van de zijmuren staat een kamerbuffet (*ĉambra bufedo*), achter welks glazen deurtjes men karaffen, glazen, borden enz. kan zien. In sommige huiskamers kan men een divan, een schrijfbureau en een boekenkast vinden. Behangselpapier bedekt de muren. Aan de muren hangen enige schilderijen of platen. Boven de schoorsteenmantel bevindt zich een spiegel. Een kachel of haard (*fajrujo*) dient (*utilas*) om gedurende de winter de kamer te verwarmen. In sommige huizen vindt men centrale verwarming (*centra hejtado*). In vele huiskamers vindt men tegenwoordig ook een radiotoestel of een piano.

Opgave 5. Vertaal in Esperanto en leer de woorden die u niet kent.

DELENTE IS BEGONNEN.

Maart is de maand, waarin de overgang van de winter in de lente plaatsvindt (*okazi*). De 21ste Maart is de lente begonnen. Die 21ste Maart is een merkwaardige dag, evenals de 21ste September. Dan duurt overal op onze aarde de dag even lang als de nacht. De lente is het jaargetijde van de wedergeboorte. Ofschoon stormen en regen ons nog vaak herinneren aan de onaangenaamheden van de winter, voelen wij toch iets in de lucht (*atmosfero*), dat ons verkondigt, dat het barre (*severa*) jaargetijde is voorbijgegaan. De knoppen bersten en de jonge frisgroene bladeren ontvouwen zich (*distaldigās*).

Na het sneeuwklokje (*galanto*) en de gele winteraconiet (*erantiso*), die reeds in de winter bloeiden, zien wij, dat talrijke planten zich achtereenvolgens (*sinsekve*) met bloemen beginnen te tooien

(*ekornamiĝi*). De iep bloeit met bruinrode bloempjes. De katjes (*amentoj*) van hazelaar, wilg, els en populier vertrouwen hun stuifmeel (*poleno*) aan de wind toe (toevertrouwen = *kontidi*). Bijen en hommels (*burdoj*) zijn hun arbeid weder begonnen en, als het weer niet te guur (*malmilda*) is, kunnen wij ze reeds in Maart zien, zoekende naar voedsel in de nog weinig talrijke bloemen. De mieren beginnen de gedeeltelijk gehavende (*ruinigita*) nesten te herbouwen. Wanneer de zon schijnt, durven (*aŭdaci*) reeds enkele vlinders zich te vertonen. De trekvogels, die ons tijdens de herfst verlaten hebben, zijn grotendeels teruggekeerd en beginnen hun nesten te bouwen of te herbouwen. Vroeg in de morgen en laat op de avond horen wij het welluidende gefluit van de merel. De kijflustige (*kverelemaj*) mussen zijn, al zoekend naar het nodige nestmateriaal, druk in de weer (*tre okupitaj*).

Reigers, aalscholvers (*kormoranoj*) en vele andere vogels zoeken takken en twijgen om hun nesten te bouwen, want de broedtijd nadert. Spreeuwen met komieke houding (*feniĝo*) en geluiden verkondigen van de daken, dat het nu lente is. Alles is gespannen (*strecita*) van (*pro*) opbruisend (*eferveskanta*) leven. Reptielen en amfibieën (*reptilioj kaj amfibioj*) ontwaken uit de winterslaap (*dumvintra dormado*). De hagedis koestert zich in de zon (*sunumas*). Het mannetje van de watersalamander pronkt (*paradas*) met zijn prachtige lentekleed. Tussen het Kroos (*femno*) vindt men reeds het kikkerdril (*ranfraĵo*). Alles bereidt zich voor op de voortplanting (*generado*).

De winter is verslagen, de zon neemt met de dag in kracht toe (*ĉiutage pli kaj pli fortiĝas*).

Het nieuwe leven is begonnen!

Bonvolu korekti en la traduko de tasko 2a, 12a linio de malsupre: kiun ni nomas; 11a linio de malsupre nikonkilo d.e. kondukilo.

Vertaling van opgave 3.

LA DOMO, EN KIU NI LOĜAS (daŭriĝo)
Sur breto ni trovas emajlitajn kaj aluminiajn kaŝerolojn, sur alia breto ujojn kun surskriboj „leo, kafo, sukero, salo, pipro“ k.t.p.: Sur la muroj pendas diversaj objektoj: lavokuveto, pato, haktabulo, haktrancilo, kribrilo, funelo, murkafmuelilo, kulereĝoj diversformaj, latharo por tualet- kaj telertukoj k.t.p. En la vitroŝranko troviĝas la teleroj, la pladoj, viandsaŭcujo, oleo- kaj vinagrobote-

HANDLEIDING BIJ HET VERTALEN

F. Faulhaber.

HET JUISTE WOORD.

Esti is soms te vlak, te bleek, te slap. Vervangen we het in zulke gevallen daarom door een ander, een „spreken-der” woord, b.v.:

1. Ili estis homoj, al kiuj mi ŝuldas dankon pro tio, kion ili al mi donis, kaj kio ili por mi estis (* Waren mensen, aan wie ik dank verschuldigd was voor hetgeen zij mij gégven hadden en voor hetgeen zij voor mij geweest waren = kiom ili por mi signifis.
2. Ĉiu letero devis unue esti skribata malnete kaj prezentata* al la patro. Tiam estis instrukcio ĝin plibonigi (.. Dan was de instructie hem te verbeteren) = Poste sekvis instrukcio plibonigi ĝin.
3. Nemezurebla, profunda vero estas en la vortoj de Jezuo (... is er in de woorden van Jezus) = Nemezureblan, profundan veron enhavas la vortoj de Jezuo.
4. Fine io okazis, kio estis de plej granda influo sur la vivo de R. (... wat van de grootste invloed was op het leven van R.) = Fine okazis io, kio havis plej grandan influon sur la vivo de R.; of: kio plej grave influis la vivon de R.
5. Li trovis centojn da objektoj, kiuj estis por li de netaksebla valoro (... die voor hem van onschatbare waarde waren) = kiuj havis por li netakseblan valoron.
6. Estas proverbo, kiu instruas al ni, ke... (Er is een spreekwoord, dat ons leert, dat...) = Ekzistas proverbo, k.t.p.
7. Morgaŭ estos ŝia naskiĝtago (Morgen is het haar verjaardag). Constatieren we alleen het feit, dat het morgen haar verjaardag is, dan is de vertaling

juist. Willen we echter te kennen geven, dat ze morgen haar verjaardag viert, dan doen we beter te vertalen: Morgaŭ ŝi festos sian naskiĝdaton.

8. Tiu ne estas ludoj por knabinoj (Dat zijn geen spelen voor meisjes) = Tiu ludoj ne taŭgas por knabinoj; of: Tiu ne estas ludoj knabinaj; A: Tiu ludoj ne decas al knabinoj.

9. Mi esperas, ke vi ĉi tie estos pli obeema (Ik hoop, dat je hier gehoorzamer zult zijn) = Mi esperas, ke ĉi tie vi kondutos pli obeeme.

Dem.: Ne kontentigas min la klarigoj pri „almenaŭ” kaj „minimуме” en L.P., n-o 2a. Laŭ P.V. „almenaŭ” signifas: ne malpli.

Resp.: En „Fund. de Esp.” troviĝas nur „almenaŭ”; tio signifas, ke en la komenco tiu vorto estis uzata por du nepre diferencaj ideoj: 1e, ne malpli; 2e, ia premiso. Post oficialigo de „minimуме” oni povas diferencigi ambaŭ ideojn per apartaj vortoj: Por okazigi kurson oni bezonas almenaŭ gvidanton kaj kursanojn. Por okazigi kurson oni bezonas minimume 10 kursanojn. Ankaŭ en la nederl. lingvo oni diferencigas inter: Ik heb tenminste 100 g. op zak (mi do ne estas senmona). Ik heb minstens 10 g. op zak (mi havas sufiĉe da mono). (La ekzemploj estas cititaj el „Even tijd voor onze taal”, J. C. v. Wageningen.) Ni atentu, ke al pluraj vortoj Zamenhof atribuis pli vastan signifon ol ili nun havas por estiĝo de novaj, pli precizaj vortoj. Kaj uzante la lingvon, oni elektu la plej trafajn vortojn! La neŝtete de „almenaŭ” evidentiĝas el la frazo „Ni atendas almenaŭ (= minimume) dek vizitantojn, sed maksimume tridek.” „Minimume” havas kontraston en „maksimume”; „almenaŭ” ne.

loj, ujoj por spicoj k.t.p. En la kuirejo, same kiel en ĉiuj aliaj ĉambroj, troviĝas elektra lumo. Ni nur bezonas turni la komutilon por funkciigi la lampon. Stopkontaktilo ebligas al ni uzi la elektran flupon (kurenton) por diversaj celoj, ekz. por la senpolvigilo (polvosuĉilo) kaj la elektraj kuiraparatoj.

Ni nun eniru la dormoĉambron. Antaŭtempe oni ofte dormis en alkovo. Alkovo estas malgrandaj ĉambroj, troviĝantaj (kiuj troviĝas) inter la antaŭ- kaj postĉambroj. Ĉar en alkovo fenestroj mankas, taglumo kaj freŝa aero ne povas enpenetri ĝin. En alkovo oni trovis du, kelkfoje eĉ pli da litŝrankoj. Oni eĉ

trovis litŝrankojn en la loĝoĉambro. Ĉar alkovo kaj litŝrankoj estas tre malhigienaj, oni vane serĉos ilin en pli modernaj domoj. Modernaj domoj enhavas kelkajn dormoĉambrojn kun fenestroj aŭ vitraj pordoj, tra kiuj taglumo kaj freŝa aero povas libere enflui. La malmodernajn litŝrankojn oni anstataŭigis per litkadroj. Krom la lito la meblaro konsistas i.a. el tualettablo (lavotablo), tolajŝranko kaj tualetspogulo. Sur la tualettablo ni vidas lavovazon, lavopelvon, kombilujon, sapujon kaj la razilaron por la virseksaj kunhejmantoj. Sur malgranda tablo staras la vekhorloĝo, kiu per sia tintado avertas nin, kiam estas tempo por ellitiĝi.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 5. Vertaal in Esperanto:

Het jaarlijks terugkerend internationaal congres van S.A.T. is voor de arbeiders-esperantisten in het bijzonder een belangrijke gebeurtenis. Niet alleen omdat men zijn kennissen en correspondenten ontmoet en nieuwe kennismakingen aanknoopt, maar vooral ook omdat men in een kameraadschappelijke sfeer de moeilijkheden en problemen van de bond tracht op te lossen.

Echter biedt zo'n congres nog een andere gelegenheid tot de ontwikkeling en de vriendschappelijke verhoudingen van de deelnemers en hun gastheren bij te dragen. Immers zij, die gedurende de congresweek een plaatsje krijgen in een arbeidersgezin, hebben een uitstekende gelegenheid kennis te nemen van de Nederlandse woongelegenheid voor arbeiders, hun gezinsleven, hun gewoonten. Veel kan hun gegeven worden met minimale moeite, en men ontvangt hiervoor minstens evenveel terug. Want onze buitenlandse gasten staan voor ons klaar om ons hun toestanden te vertellen, ons hun moeilijkheden voor te leggen. Wij kunnen vergelijken en hen op de verschillen en overeenkomsten wijzen.

Zo gezien, zal men bemerken, dat de gasten ons in een week tijds meer leren, dan de kranten ons in een geheel jaar kunnen doen.

KALKULARTO.¹⁾

Peĉjo²⁾ eniras la panbutikon³⁾ kaj demandas⁴⁾: „Kiom kostas tiu torteto⁵⁾?” „Cenddekon⁶⁾”, Peĉjo⁷⁾ estas la respondo. Peĉjo prenas la torteton en sian⁷⁾ manon, sed... hezitas. Ĉu li prefere⁸⁾ prenu⁹⁾ ĉokoladon? Jes, tion li faras¹⁰⁾ kaj (li) remetas¹¹⁾ la torteton. Kiam li post tio¹²⁾ volas foriri¹³⁾, la fraŭlino¹⁴⁾ diras: „Atentu¹⁵⁾, knabeto¹⁶⁾, vi devas ankoraŭ pagi cenddekon.”

La respondo de Peĉjo estas: „Ne, mi ja ne ricevis¹⁷⁾ la torteton?”

La fraŭlino¹⁸⁾: „Vi pravas¹⁹⁾, sed vi prenis ĉokoladon.”

Peĉjo: „Sed kontraŭ ĝi²⁰⁾ mi redonis torteton!”

1) Ook: *arimetiko*. 2) Ook: *malgranda Petro*. Het achtervoegsel „et” wordt gewoonlijk bij eigennamen niet gebruikt.

3) Ook: *panejon*, *la butikon de la bakisto*. „Panejo” kan echter ook een magazijn zijn. 4) Niet: *petas*; dit betekent:

vragen, verzoeken. 5) Niet: *torteton*. De gehele zin staat op de plaats van het lijdend voorwerp. Van deze bijzin is „torteto” het onderwerp. 6) Bijna steeds ziet men vertaald „dekendon”. O.i. is deze vertaling niet correct. „Deko da cendjo” is „cenddeko” (zie het artikel over „wortkunmeto” in L.P. van 15 Oct. 1947). Ook: *dek cendjojn*. Niet: *dekmoneron*. 7) Ook: *la*. 8) „Niet” is een „naciismo”. Men bedoelt juist „wel”. 9) Na een wens gebruike men de aanvoegende wijs. Ook: *aĉetu*. 10) Ook: *faros*. 11) „Denove metas” veronderstelt, dat hij het reeds neergelegd had en het daarna nogmaals doet. 12) De betekenis van „nu” is: daarna. 13) Niet: *forkuri* = (hard) weglopen. 14) Ook: *helpistino*, *butikistino*, *vendistino*, *komizino*. 15) Ook: *he*, *ho*. 16) Niet: *fihometo*. De juffrouw gebruikt het woord in liefkozende zin. Ook: *bubo*. Niet: *virulo*. 17) Ook: *aĉetis*. 18) Met het lidwoord! 19) Een woordelijke vertaling is lelijk en stijlloos: *tio estas tia*. Ook: *tio estas vera*. 20) Ook: *por tio*, *kompanse*. Vertaling van opgave 3.

Esperanto is een gemakkelijk te leren taal, maar slechts betrekkelijk, namelijk in vergelijking met nationale talen. Als men Esperanto niet grondig bestudeerd heeft, kan men — evenals in de moedertaal¹⁾ — fouten maken. En die fouten maakt men des te lichter²⁾, naar gelang men de taal gemakkelijker beschouwt. Bovendien kunnen gewoonten in de nationale taal de auteur of vertaler ernstig hinderen en zijn product gedeeltelijk onbegrijpelijk maken voor buitenlanders.

¹⁾ Men vertale niet woordelijk met „ouderlijke taal”. In onze taal zegt men „moedertaal”.

²⁾ Beter dan: *gemakkelijker*, daar dit woord direct weer volgt.

Beoordeling: Astor, opg. 2: 7; opg. 3: 8.

RESPONDOJ AL ASTOR.

En la frazo „Okaze de tiu ĉi rakonto Nazor metas unun el la grandaj demandoj” la akuzativo ne estas necesa, sed permesebla. Ĉar „unu” povas havi pluralon (*unujn*), kiu iafoje eĉ povas esti akuzativa (*unujn*), kelkaj aŭtoroj ne skrupulas uzi ankaŭ „unun”. Kutima formo ĝi tamen ne estas.

La verbo „seni” en „sed ankaŭ la novelo de M.E. ne senas impresivan forton” (L.M., 1—2) signifas *esti seni*. Ĝi estas regule formita, sed maloftega. Pli klara estas „sed ankaŭ al la novelo de M.E. ne mankas impresiva forto.”

„Streta” (L.M., 1—2) estas neologismo por „mallarĝa”.

NOMARO DA MALSANOJ EN ESPERANTO

Nesufiĉa spaco estis kaŭzo, ke nia listo en la jan. n-o estis tro konciza kaj pro tio kelkriate neklara. Danke ni akceptis kritikojn kaj atentigojn de s-roj Mook kaj Slijper, kiujn ni ĉi sube respondos kune kun iliaj demandoj.

Kiel fonton por nia nomaro ni uzis „Medicina Vortaro” de d-ro Briquet. Niaj nomoj do ne estis proponoj, sed jam ekzistantaj vortoj.

Beenvliesontstekig = *perioistito*; -ilo estis preseraro.

Blaasontstekig. Ni menciis nur *blenurio* = vezika kataro; la inflamo de l' veziko estas *cistito*.

Bloedblaar. Laŭ P.V. *ekimoso*. Ni preferis la formon en M.V.: *ekimozo*. Ni ne vidas motivor por anstataŭigi ĥ per k. Buiktyphus. Ni elektis la nomon el M.V., kiu mencias: *tifoido* (ventra tifo), unu el la tri formoj de tifo: ekzantema, rekuranta kaj ventra aŭ abdomena t.

Buikvliesontstekig. S-ro Sl. preferas *peritonito*, ĉar science la nomo estas *peritonitis*. M.V. tamen mencias *peritoneito*, regule formitan el *peritoneo* (buikvlies) + *ito*.

Dikkedarmonststekig; d.e. *kolito* aŭ *kojlonito*. *Tiflito* = inflamo de l' cekumo (blinde darm).

Galsteen. D.e. *gallitiazio*; *galitiazio* estis preseraro. Laŭ M.V. ankaŭ *hoelilitiazio*. *Isĉias*. Laŭ P.V. *iskiatiko*. Ni preferis la formon el M.V.: *ishiatiko*.

Kankerzweer = *karcinomo*. K-do Sl. atentigas, ke ekzistas ankaŭ *sarkomo*, kiun ni ne menciis. Prave, nia listo ne estis kompleta! K-do Sl. preferas: *kankergezwel* = *kancera tumor*; *kankerzweer* = *kancera ulcero*. Kompreneble tre bone; ni menciis *karcinomo*, kiu vorto jam estas multe uzata.

Maagkramp. S-ro M. preferas *kardialgio*, ĉar *kardiospasm* estas la plej malofta. La unuan nomon ni ne trovis en M.V. Ruggemergstering. Pli ĝusta ŝajnas al ni *mjela atrofio*, kvankam M.V. ĝin ne mencias.

Spatader. S-ro M. preferas *varico* laŭ latina *varices*. M.V. mencias *variko* laŭ franca *varicosités*.

Struma. Laŭ s-ro M. struma ne estas inflamo, pro kio *strumito* (-ito = inflamo) ne taŭgas. M.V. mencias: *strumito*, inflamo de kropo.

Thrombose. La kritikintoj atentigas prave, ke trombozo ne estas la sama kia embolio. Embolio estiĝas, se ia materio ŝtopas arterion. Trombozo estas ŝtopiĝo de vejno. Embolio povas esti sekvo de trombozo, se sanga ŝtopaĵo ekfluas el

vejno kaj venas en arterion.

Zwarte staar. S-ro M. informas, ke laŭ nuntempaj konstatoj tio ne estas unu malsano, sed kolektiva nomo por diversaj malsanoj. K-do Sl. preferas *nigra katarakto*. M.V. mencias *amaŭrozo*.

K-do Slijper preferas plurokaze formi nomon el jam ekzistantaj Esp. radikoj, ekz. *galŝtono*. Certe, ne sciante la sciencan nomon, oni povas uzi tiajn helpilojn, sed, la scienco bezonas specialajn nomojn; ili do ekzistas. Nia opinio ne ekzistas motivo por ne lerni kelkajn plej ĝenerale konatajn. Ĉiurilate ili estas pli precizaj, kaj kaŭzo por miskompreno ne estiĝas. Ni scivolas, kiel laiko ekz. tradukus *scheurbuik* (*skorbuto*).

Dem.: Mi konstatis, ke ne regas inter diversnaciaj unuecan opinion pri la nomo de la kontinento Aŭstralio. Francoj nomas ĝin Oceanio. Kiel vi opinias pri tio?

Resp.: Efektive ekzistas diversaj opinioj. La francoj ni ne konas. En Esperanto, tamen, la nomo Aŭstralio estas ĝenerale uzata por la tuta mondparto, kiu konsistas el la kontinento kaj la arhipelagoj (insularoj). La kontinento, antaŭe nomita Nova Holando, nun ankaŭ nomiĝas Aŭstralio. Tiu nomo do havas du signifojn: por la mondparto kaj por la kontinento. La tuta cetera parto nomiĝas Oceanio kaj konsistas el Nova Zelando, Melanezio, Mikronezio kaj Polinezio. „Oceanio” oni ne uzu por la kontinento, ĉar ĝi konformas nur al la multego da insuloj en Pacifiko (la oceano).

Dem.: Mi petas vian konsilon pri la participo kaj verbo en la jenaj frazoj: „La fondanto de nia grupo estos morgaŭ 50 jara” (-anto, ĉar li vivas ankoraŭ).

„La fondinto de la kristanismo estas Kristo” (-into, ĉar Kristo mortis).

Resp.: La tradukoj ne estas korektaj. La persono, kiu iam fondis, estis dum la fondo *fondanto*, ĉar li tiam estis *fondanta*. Nun li tamen estas *fondinto*, sendepende de tio, ĉu li poste mortis aŭ ne. Do ankaŭ Kristo estas la *fondinto* de l' kristanismo. La frazon oni povas daŭrigi jene: estis Kristo, ĉar Kristo mortis. Sed, ĉar spirite li ankoraŭ vivas, oni diras prefere: „. . . . estas Kristo”. Tamen, ankaŭ tiu, kiu ne akceptas la kristanan koncepton pri pluvivado spirita, prefere diras „estas”, ĉar ĉiuj grandaj homoj spirite pluvivas en la historio. Se oni nepre preferas la estintan tempon, oni diru: „La *fondanto*. . . . estis. . . .”, ĉar dum la fondo li estis ja *fondanta*.

